# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 5 F.                C. C. P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1975 ——— N° 54

# NIA JARKONGRESO EN LUNEL

Bedaŭrinde ne multaj federacianoj partoprenis nian ĉi-jaran kongreson, la 9-an de marto. Ni estis nur dudeko, kio estas tro malmulte.

Partopreni en la ĉiujara federacia kongreso estas la okazo sin retrovi por diskuti pri niaj problemoj kaj interesiĝi pri la vivo de nia movado je ĉiuj niveloj, federacia, nacia kaj internacia,sed ankaŭ atesti ke ni apartenas al "vivanta popolo".

En Lunel ne ekzistas esperantista grupo kaj, pro tio, la esperantista grupo de Montpellier havis la bonegan ideon tie aranĝi la federacian kongreson por provi veki interesiĝon pri Esperanto.

Niaj Montpellier-aj gesamideanoj bone faris ĉion necesan - kaj ni devas ilin gratuli kaj danki - por ke la kongreso povu disvolviĝi je tre favoraj propagandaj kondiĉoj: artikoloj en la loka gazetaro, uzebleco de tre alloga kunvenejo (kiom "perditaj" ni nin sentis en la salonego), kaj aranĝo de tre celtrafa ekspozicio far ges-roj Lentaigne. Nur mankis la sufiĉe kontentiga nombro da kongresanoj! Kia sendankema rekompenco por niaj Montpellieraj geamikoj!

La urbestro de Lunel venis, iom antaŭ la antaŭvidita horo sed devis baldaŭ foriri. Eble, en si mem, li pensis: "ĉu tiu "anaro" estas la kvardepartementa esperantistaro? Ĉu utilas ke urba instanco apogu la esperantistojn kaj sekve Esperanton?"Kia malbona reklamo por Esperanto pro la apatio de la esperantistoj mem.

La arondismenta deputito invitita, pro foresto, ne povis veni sed sendis senkulpigan kaj kuraĝigan leteron. Ankaŭ S-ino Gibez et Crest sendis kuraĝigan leteron.

Ĉiuj federaciaj estraranoj kaj konsilianoj ĉeestis krom S-roj Raynaud kaf Pelletier kiuj, pro malsano, ne povis veni.

S-ro Deligne komentis la financan situacion, kiun vi cetere legos en ĉi-numero.
S-ro Frus presis belegajn kartojn reprezentante foton kaj permanan dediĉon de Zamenhof, kiun ni vendos je la profito de la federacia kaso. La vere malalta fiksita prezo estas 0,50 fr. popece. Restas ankaŭ kvincento da afiŝoj kies prezo estas 0,30 fr popece. Al la ĉi-supraj prezoj aldoniĝas la sendkostoj pagotaj de la mendintoj. Por la mendoj sin turni al la federacia sidejo.

Nun necesas propagandi pri niaj kartoj kaj afiŝoj. Dubo ne estas ke ili rapide disvendiĝos konsidere la bagatelan prezon por altkvalitaj propagandiloj. Tion ni ŝuldas al nia amiko Frus. Por ne ĝeni niajn financojn S-ro Llech-Walter pagis la fakturon pri la kartoj kaj li ricevos la monon kiam sufiĉe kontentiga kvanto da kartoj estos disvendita. Notinde estas ke la kvinono de la kartoj jam vendiĝis en Lunel.

Dum la preparo de la baloto por U.F.E. parolis pri la agado de la grupoj Alès: S-ro Raynaud, perletere - Béziers: S-ino Authier - Montpellier: D-ino Vierne, S-ro Lentaigne, F-ino Bony - Narbonne: S-ro Deligne - Nimes: S-ino Volpeliere kaj D-ro Salan - Perpignan: pri la kvartala grupo "Le Moulin à Vent": S-ro Amouroux.

Ĝis nun la federaciaj estraro kaj konsilio konsistis el 11 membroj. Estis decidite pligrandigi la nombron ĝis 15 kaj D-ro Salan estis elektita federacia konsilano. Ne nepre necesas provizi ĉiujn postenojn sed estus bone ke almenaŭ unu plia bonvolemulo el Montpellier kaj Narbonne akceptu transpreni postenon.

Kiel bone konata S-ro Lentaigne posedas "migrantan ekspozicion", tre valoran propagandilaron, kiun ni povis aprezi en Lunel kaj kiun, ĝis nun, li disponigis al la plej diversaj grupoj kontraŭ simpla pago de la sendkostoj (sendo kaj resendo) kaj bagatela luprezo. Dank'al la kunlaboremo de du samgrupanoj, S-roj Capus kaj Diez, la tuta materialo estas denove preta por rekomenci propagandajn turneojn tra la lando, ĉi-foje, eble, lige kun U.F.E.. S-roj Lentaigne kaj Guillaume jam interrilatis pri tio.

En la kadro de la tutjara kampanjo "Jaro de la Virino", D-ino Vierne donis al ni sian vidpunkton pri la "socia kaj kultura pozicio de la virino". D-ro Salan bonvolis doni la sian pri la nuntempa stato de la movado kaj anoncis la baldaŭan aperon de libro kiu estos la esperantlingva adapto de liaj publikigitaj "rememoroj", en la franca lingvo, pri lia deportiteco.

Fine S-ino Volpeliere raportis pri sia propagandvojaĝo, kun la edzo, tra Svedio, pri tutmondismo.

Post la komuna tagmanĝo en tre plaĉa restoracio rekomenciĝis la laboro.

Ni provis trovi solvon por ŝtopi la deficiton kaŭzitan de nia federacia ligilo "Sudfrancia Stelo". Findecido estis prokrastita ĝis nia oktobra laborkunsido, sed dume estis decidite (por: 11 - kontraŭ: 3) ke la venontaj numeroj aperos sen la humora kaj krucvorta paĝoj.

Neniu preciza projekto de deziresprimo por la nacia kongreso de Tours estis diskutita. D-ro Salan estos la reprezentato de la faderacio en Tours kaj konfirmos la jam esprimitajn deziresprimojn pri:

- reformo de la kotizsistemo de U.F.E., jam prezentita dum la nacia kongreso en Luksemburgo ("Sudfrancia Stelo" n° 47-a).

- gvdlinio de nia federacio pri la nuna situacio de U.F.E. kaj U.E.A. ("Sudfrancia Stelo" n° 53-a).

Jen la rezulto de la baloto pri la agado de U.F.E. en 1974.

Rajtis voĉdoni: 41 Voĉdonis: 17

Ĉu vi aprobas la agadraporton ? : Jes: 16 Sindeteno: 1

Ĉiu el la 12 kandidatoj por la konsilio ricevis 17 aprobojn.


Publika prelego pri Esperanto finis tiun kongresan tagon. Bedaŭrinde al mi ne eblis ĝin ĉeesti.

La oktobra laborkunsido kaj la venontjara federacia kongreso okazos en Narbono je fiksotaj datoj.

---

Kiel dirite en Lunel mi rezignas la sekretarian postenon. Tamen, por ne ĝeni la preparon de nia aŭtuna laborkunsido en Narbonne, ĝis tiam mi plenumos la funkciojn. Ĝis revido en Narbono.

Jean AMOUROUX.




# Financa Raporto okaze de la Kongreso en Lunel la 9-an de marto 1975

Denove mi havas la taskon konigi al vi nian financan situacion.

Nia tuta havaĵo, hodiaŭ, konsistas el:

En la poŝtokonto ................................. 290,47

En la ŝparkaso, inkluzive la rentumon
de la pasinta jaro .................... 829,00

En la kaseto ...................................... 221,45

Do, entute ......1 340,92 frs.

Sed ne forgesu ke, el tiu sumo, mi devos pagi al S-ro **FRUS**, fine de la monato, por la unua trimestro de SFS, proksimume 200,00 frs.

Do, rondcifere, restos nur 1 100,00 frs. la unuan de aprilo.

Se ni komparas tiun sumon kun tiu kiun ni havis pasintjare, je la sama dato dum la Kongreso en Béziers (1 263,00 frs.), ni konstatas ke:

I° - Nia financa situacio difektiĝis, malgraŭ la fakto ke la federacia parto de la kotizoj kreskis.

2° - En Béziers la konto de SFS havis krediton da 164,00 frs. Hodiaŭ ni havas deficiton da 227,00 frs. Mi devas memorigi ke pasintjare, ni ricevis anoniman donacon por SFS, da 100,00 frs, kiun ni ne ricevos ĉijare.

Tiu situacio devenas de la fakto, ke multaj amikoj kiuj pagis sian kotizon por 1974 ne ankoraŭ faris tion por 1975, kaj aliflanke, se mi ricevis por 1974. 74 abonojn por SFS, ĝis nun mi ricevis nur 46 abonojn.

Nu, oni povas konsideri ke, nuntempe, financa situacio kiu stagnas regresas, kaj la nia faras pli ol stagni.

Do ni devas instigi niajn amikojn pagi sian kotizon plej eble rapide, kaj intensigi niajn penojn por varbi.

Sed ni devas ankaŭ ŝpari tiom kiom ni povas kaj, koncerne min, la nuraj ŝparoj kiujn mi povas fari, estas en la korespondado.

Kaj denove, ĉi-tie, kaj pere de la voĉo de nia bulteno, mi turnas min al vi kaj refaras la samajn konsilojn, kiujn mi jam faris, kaj kiuj estas:

1° - Ke la korespondeculoj de la grupoj sendu sian monon senpere al nia poŝtkonto (nº 956 - 28 Montpellier) kaj en unu fojo, eĉ se tio devas prokrasteti iliajn sendojn.

2° - Ke la izoluloj faru sian eblon por sendi la kotizon al la plej proksima grupo de sia loĝejo, kaj tiu grupo sendos iliajn kotizojn samtempe kiel la siajn al Montpellier.

Ĉar ne forgesu ke, ĉiam izolulo pagas naŭfrankan kotizon, revenas al ni nur unu franko el kiu mi devas pagi du kovertojn, unu por sendi la monon al Parizo, kaj unu alian por sendi la ruĝan kuponeton kiu atestas ke oni pagis la kotizon. Konsekvence, mi pagas du poŝtmarkojn kaj eĉ nekalkulante la prezon de la kovertoj, tio kreas deficiton da 20 centimoj.

Pri la funkciado de SFS, ni devas esti tre prudentaj. Ni devas presi la plej ĝustan nombron da numeroj, kaj tiu nombro devas kreski nur laŭ la nombro de la abonantoj. Se ni sendas senpagajn numerojn, ni devas limigi la nombron tiom kiom ni povas.

Fine anstataŭ unuope sendi la bultenon al ĉiu, eble ni povus ope sendi ilin al ĉiu grupo, kiu farus la disdonadon al siaj membroj.

Tio estas nur propono. mi opinias ke per ĉiuj rimedoj ni devas ŝpari, kaj plibonigi nian funkciadon, kaj precize, ĉu tio ne estas la celo de Kongreso ?

Maurice DELIGNE.

---

## Departementa Federacio GARD

La ĝenerala jarkunveno okazis en Nimes (urba biblioteko) dimanĉon la 16-an de februaro.

Temis, unualoke, pri uzo de la departementa subvencio. Ni decidis provi la efikecon de "pagataj anoncoj" sur regiona gazeto. Ilin ni aperigos ekde la mezo de septembro por reklami pri la vintraj kursoj.

En rilato kun tiu propaganda plano, ni starigos ekspozicion en Uzès kaj tie aranĝos regionan renkontiĝon dimanĉon la 21-an de septembro.

Frus estas komisiita zorgi pri la fabrikado de flagrubando.

P.S. - Kotizo (2 Frs.) plus abono al Sudfranca Stelo (5 frs.) tio estas 7 frs. Oni bonvolu pagi al:

Fédération du Gard pour l'Espéranto

C.C.P. - Montpellier - 1 - 857 - 07

---

# VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## Montpellier

Nia grupo funebras

Nia amiko LENTAIGNE perdis sian patrinon.

Ni kondolencas geLentaigne kaj Renaton.

Post pli ol unujara restado en malsanulejoj nia malnova amikino sinjorino Irène RIVIERE mortis. Ŝi estis unu el la plej malnovaj geesperantistoj de nia urbo. Kiam mi alvenis en Montpellier, antaŭ 21 jaroj, ŝi estis la kasistino de la tiama grupo. Poste fidele ŝi partoprenis la kunvenojn de la nuna grupo kaj regule ĉeestis malgraŭ sia aĝo ĝis kiam la malsano retenis ŝin en la lito.

Sian vivon ŝi dediĉis al la amo kaj servo de la homoj kaj de la paco: instruistino, kristanino, agema en porpacaj movadoj, sindikatistino, dum sia emeriteco ŝi uzis la tempon vizitante malsanulojn kaj izolulojn.

Ŝi lasas multajn geamikojn.

Informagado

- dum julio en Lamalou-les-Bains prelego kun titolo: "Esperanto, langue d'avenir ?" anoncita
  - per deko da afiŝoj,
  - per anoncoj en loka kaj regiona gazetoj,
  - kun serio da aliaj prelegoj per 1.000 flugfolioj.
- dum aŭgusto, en Agde: monda kongreso de naturistoj kun 17 nacioj, ĉiuj partoprenantoj ricevis la seslingvan flugfolion de U.E.A.
- dum novembro, 500 afiŝoj por anonci la publikajn kursojn, gluitaj sur la muroj de la urbo, 1.000 flugfolioj disdonitaj sub viŝiloj de aŭtomobiloj.

Kurso

Fraŭlino BONY sukcese gvidas kurson en "Centre International des Jeunes" pere de aŭd-vida metodo de SEKEJL.

D-ino Yvette VIERNE.

---

# Nia Literatura fako

Dum la lasta mondmilito nia samideano, Doktoro SALAN, el Nimes, estis deportita en naziajn koncentrejojn el kiuj li mirakle revenis je la fino de 1945-a majo.

Unu jaron poste li eldonigis franclingvan verkon titolitan: " Franciaj malliberejoj kaj germaniaj punlaborejoj", en kiu li ĉefe rakontis siajn germaniajn travivaĵojn.

Tiu verko estas de tre longatempe elĉerpita.

Okaze de l' tridekjara datreveno de la liberigo de l' naziaj koncentrejoj, - kiu

okazas ĉijare, - li pensis dece, bone kaj oportune adapti esperantlingven sian franclingvan verkon por eventuala internacia legantaro.

Sub nova titolo: " De Neŭengamme al Ravensbrück" ŝia adaptaĵo aperos post kelkaj monatoj.

Ĝi ne prezentiĝos kiel romano kaj tion tute ne celas. Ĝia sola ambicio estas koncize kaj objektive raporti la vivon kaj la morton de homoj pri kiuj oni sendube jam tre multe skribis en tuta Eŭropo, sed pri kiuj mankas en la esperanta literaturo subskribo de franca esperantista deportito.

Ni opinias, ke tiun ambicion ĝi atingis, kaj ni deziresprimas la tre baldaŭan aperon de tiu originala adaptaĵo.

Tia literaturo mankas ja en nia esperanta librostoko. Ĝi oportune ŝtopas breĉon sur nia librobreto.

Amatora recenzisto.

---

Tiuj "Suplementaj folioj" kostos nenion al nia regiona kasisto. Ĝi ja estas pagita pere de tute anonima subvencio, kiun al nia presejo provizis esperantisto, al kiu ĝia distra enhavo permesos digesti la kvarpaĝajn organizajn informojn.

Esperanto nek devas, nek povas, fariĝi nura kapdoloriga afero.

Roberto FRUS.

Necesis komplete rebaki ĝin... aŭ ĝin malmunti. La Heraŭlta (sendependa) Federacio, por la bono de la tuta movado, decidis malavare subvencii la rebakadon.

Kosto: ĉ. 1 000 fr.(100 000 centimojn). Tamen, ĉar ĝi konsideras, ke tiu materialo, estas "ĉies kaj nenies propraĵo" kaj ke ĝi koncernas ĉiujn el ni, ĝi kun plezuro akceptus etan donacon: nome: du frankojn. Se 500 esperantistoj....... Dankon!

Sendu kaj sendigu: 2 fr. al
FEDERATION DEPARTEMENTALE ESPERANTO HERAULT
CCP 1 689 89

# KRUCVORTOJ

## Horizontale ✻

1– Manĝilo – Fervore deziri akiri ion altigan (R)

2– Numeralo – Malfermaĵo

3– Participa sufikso – Tubopeco servanta por kunigi du tubojn

4– Olei – Pagilo

5– Manĝebla riverfiŝo – Montra pronomo Direkti sin al iu celo (R)

6– Ligna kuvo – Bele kantanta birdo

7– Figursence: ŝirmejo (R) Manlaboristo

8– Revolucia konsilio – Sufikso

9– En somero – Volonte kaj plezure uzi ion – Multe da tempo

10– Greka litero – Maleopilko – Kaprica, nedaŭra kutimo (R)

11– Intence neatendebla

12– Frukto kun acideta suko (R) Fermita kurbo imitanta elipson

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | ■ | | | | | |
| 2 | | | | ■ | | | | | | | | |
| 3 | | | ■ | | | | | | | | | ■ |
| 4 | | | | | | | | ■ | | | | |
| 5 | | | | | | ■ | | | | ■ | | |
| 6 | | | | | ■ | | | | | | ■ | |
| 7 | | | | ■ | | | | | | | | |
| 8 | ■ | | | | | | | ■ | | ■ | | |
| 9 | | | ■ | | | | ■ | | | | | |
| 10 | | | ■ | | | | | | ■ | | | |
| 11 | | | | | | | | | | ■ | ■ | |
| 12 | | | | | | | ■ | | | | | |

R. Raynaud

## Vertikale ✻

1– Virina vestaĵaro – Aroma substanco por bongustigi la manĝaĵon (R) – 2 – Plenigi per emocia fervoro – 3 – Ricevi ion por ĝin uzi dum difinita tempo pagante interkonsentitan prezon (R) – Budista pastro. En vintro – 4 – Difinita parto de kurbo – Gasa formo de substanco (R) – 5 – Spoko – Kapablo ne forgesi – 6– Maldiafana (R) – Ties bluo oni uzas kiel antisepsaĵo (R) – 7 – Akcesora suplemento – En la mezo de robo – 8 – La poetiko estas tiu de la poezio (R) – Movigi per piedoj – Malagrabla grenkampa trudherbo – 9 – Pliviglilo – Estas arto esti tiu (R) –
10 – Sangosuĉanta insekto – Verba finaĵo. Eo Nimo – 11 – Moko (R) – Ceremonia vira vesto de la antikvaj romanoj – 12 – Nomo de litero – Kuraca arto korekti aŭ malhelpi korpan deformaĵon –


✱ (R) – Nur radiko

✱ Solvo de la antaŭa problemo


Solvo de la krucvortoj aperinta sur la N° 53

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| F | R | A | N | D | E | M | A | ■ | E | T | A |
| R | E | V | U | O | ■ | A | B | O | M | E | N |
| E | G | A | L | ■ | K | L | A | R | I | G | I |
| N | U | R | ■ | K | A | L | K | A | N | U | M |
| E | L | ■ | A | R | M | I | ■ | ■ | E | M | A |
| Z | O | R | G | E | ■ | B | R | U | N | E | L |
| U | J | O | ■ | D | U | E | ■ | E | T | N | O |
| L | ■ | T | R | I | ■ | R | E | D | U | T | ■ |
| O | R | O | ■ | T | R | A | M | ■ | L | O | Ĝ |
| ■ | E | N | V | I | O | ■ | A | B | I | ■ | O |
| I | N | D | A | ■ | K | A | N | I | N | O | J |
| S | T | O | K | O | ■ | B | I | Z | O | N | O |


# 5 minutoj da intervalo



*Li vivas daŭre ekster la Mondo.*




*SEN VORTOJ*



*SEN VORTOJ*



*Atŝum ! – Je via sano !*



*Nun mi kapablas aŭskulti eĉ Tokio-Radion.*



*SEN VORTOJ*



*Kiam la popoloj povos libere*
*sin kompreni, tiam ili ĉesos*
*reciproke sin malami.*

*Zamenhof*

*« Quand les peuples pourront se comprendre,*
*ils cesseront de se détester ».*
L. L. ZAMENHOF
*(Créateur de l'Espéranto).*

Edité par la FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE LANGUEDOC-ROUSSILLON
72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN.

---

Mendu la lastajn poŝtkartojn kun bildo de Doktoro Zamenhof, nur po 0,50 F. Rekte al la adreso de nia Esperanto-Federacio en Perpignan.

☆ ☆ ☆

# COLETTE 1873 - 1954



*La sereneco de la centjarfesto ebligas lokigi, en pura lumeco, la kompleksan personon de Colette kaj signi la etapojn de verkado dediĉita al la strebado pri la vivo de estulino, kiu prave diris: "Mia reĝlando Troviĝas sur la tero".*

*La sekreto originas de lainfaneco: "Vi ne imagas kia reĝino de la tero mi estis je dekdujara" skribos pli malfrue Gabrielle, Sidonie, Colette, naskiĝinta en 1873 ĉe le limoj de Burgonjo kaj Morvano. Sia patro de tulona deveno, modeste deĵoris en la impostkolektejo de Saint-Sauveur en Puisaye. Sia patrino, reveninta al Parizo estis retrovinta siajn originojn en la burgonja hejmgrundo, kies ĉiujn sekretojn ŝi instruis al la infano.*

*Multe stampita per la influo de la naskiĝodomo, la junulino komprenos nur iom post iom la instruojn de la patrina saĝeco. Je dudekjara, enamiĝinta al sendependeco, ŝi edziniĝas kun pure parizeca ĵurnalisto, kiu subskribas per la krommomo Willy la serion de la Kvar "Claudine", verkita de la juna virino en la unuaj jaroj de la Jarcento.*

*Si estas 33 jara kiam la eksedziĝo inspiras al ŝi en 1907 la "Retraite sentimentale", unua el ŝiaj dramoj de l'geo. Inter la "Spiraletoj de la vito" (1908) kaj la "Vagulino" (1910), la leganto ekkaptas la pasion de Colette por tiu nekvieta libereco, kiu vivigas al ŝi, samtempe, en la kadro de la varietea teatro, disan ekzistadon.*

*La dektri jaroj de ŝia dua edziniĝo, kun Henri de Jouvenel, estas signilizataj per la naskiĝo de filino, la Carma Bel-Gazou el la patrinaj romanoj kaj per la primilitaj kronikoj senditaj el Italio kaj distingitaj de Marcel Proust. Aperas tiam pristudoj pri moroj, kiuj estas amromanoj pri ĵaluza amo aŭ diseca geo, pri infaneco kaj adoleskeco: "L'Entrave" (1913) kaj "Chéri" (1920), "La Maison de Claudine" (1922) kaj "Le Blé en herbe" (1923).*

*Post dua eksedziĝo, okazinta en 1925, Colette dividas sian ekzistadon inter ŝia domo en Saint-Tropez, "La Treille-muscate" kaj ŝia Pariza apartemento, kiu donas vidon sur la ĝardenoj de l'Palais-Royal.*

*Siaj kvindek jaroj inaŭguras tiam kvaronon de jarcento de riĉa verkado kie la kutimaj temoj disfloras en la matureco.*

*"La Naissance du Jour (1928) kaj "Sido" (1929) estas poeziaj kaj voluptemaj elvokaĵoj de la provenca kaj burgonja naturo. "Duo" (1930) kaj " La Chatte" (1933) andlizoj pri la konfuzo de la ĵaluzeco. Tiuj "Plaisirs" kaj "Prisons kaj Paradis" (1932, boradoj en la misterajn ligecojn inter sensaĵojn.*

*Fariĝinta en 1935 S-ino Maurico Goudeket, Colette estas famkonata verkistino, membrino de la reĝa belga Akademio kaj de la Akademio Goncourt, altoficiro de la Honorlegio. Si akceptas la vivon tia, ĝi estas kaj rezistas kontraŭ la doloroj pli kaj pli akraj de artrito kun kuraĝo nuancita de kutima ironio.*

*La romanistino daŭrigas siajn studojn pri la virina animo en "Julie de Carméhan" (1941) kaj en "Gigi" (1943). Sed (Parizo el mia fenestro" (1942) associas la plisaĝigitan pripenson kun la poezia esprimo. Tria estos là tono de ŝiaj lastaj verkoj - ŝi forpasas en 1954 kaj tiuj titoloj lumigas la finon de tiu ekzistado per sensriĉaj lumoj.*

*Cu "L'Etoile Vesper" (1947) ne estas Venusa ekaperanta el la boskoj dè Saint-Sauveur meze de kvietigita krepusko ? kaj ĉu "La Fanal bleu" (1949) ne lumigas por ĉiam por ni, legantoj, tiun atenteman vizaĝon klinitan sur la nokta tablo, kie subtila mano karesanta la kutimajn katojn, detalas per neimitebla esprimo, la pripensojn kaj la spertojn de tuta vivo ?*




Ĉi supre reprodukto de la memorfolio N° 240 - Jam de la 1-7-72 la eldonejo C.E.F. en Nico emisiis filatelajn memortabulojn je la profito de socia servo de P.T.T. jam aperis 290 folioj el kiuj 80 en lingvo Esperanto. Interesatuloj en Francio povas aboni ĉe la Franca sekcio en GAP (30 F frankoj por 5 sinsekvaj ekzempleroj), en aliaj landoj (25 irk por 4 ekzempleroj).

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 1er Trimestre 1975

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes



# COLETTE 1873 - 1954

*La sereneco de la centjarfesto ebligas lokigi, en pura lumeco, la kompleksan personon de Colette kaj signi la etapojn de verkado dediĉita al la strebado pri la vivo de estulino, kiu prave diris: "Mia reĝlando Troviĝas sur la tero".*

*La sekreto originas de lainfaneco: "Vi ne imagas kia reĝino de la tero mi estis je dekdujara" skribos pli malfrue Gabrielle, Sidonie, Colette, naskiĝinta en 1873 ĉe le limoj de Burgonjo kaj Morvano. Sia patro de tulona deveno, modeste deĵoris en la impostkolektejo de Saint-Sauveur en Puisaye. Sia patrino, reveninta al Parizo estis retrovinta siajn originojn en la burgonja hejmgrundo, kies ĉiujn sekretojn ŝi instruis al la infano.*

*Multe stampita per la influo de la naskiĝodomo, la junulino komprenos nur iom post iom la instruojn de la patrina saĝeco. Je dudekjara, enamiĝinta al sendependeco, ŝi edziniĝas kun pure parizeca ĵurnalisto, kiu subskribas per la krommomo Willy la serion de la Kvar "Claudine", verkita de la juna virino en la unuaj jaroj de la Jarcento.*

*Si estas 33 jara kiam la eksedziĝo inspiras al ŝi en 1907 la "Retraite sentimentale", unua el ŝiaj dramoj de l'geo. Inter la "Spiraletoj de la vito" (1908) kaj la "Vagulino" (1910), la leganto ekkaptas la pasion de Colette por tiu nekvieta libereco, kiu vivigas al ŝi, samtempe, en la kadro de la varietea teatro, disan ekzistadon.*

*La dektri jaroj de ŝia dua edziniĝo, kun Henri de Jouvenel, estas signilizataj per la naskiĝo de filino, la Carma Bel-Gazou el la patrinaj romanoj kaj per la primilitaj kronikoj senditaj el Italio kaj distingitaj de Marcel Proust. Aperas tiam pristudoj pri moroj, kiuj estas amromanoj pri ĵaluza amo aŭ diseca geo, pri infaneco kaj adoleskeco: "L'Entrave" (1913) kaj "Chéri" (1920), "La Maison de Claudine" (1922) kaj "Le Blé en herbe" (1923).*

*Post dua eksedziĝo, okazinta en 1925, Colette dividas sian ekzistadon inter sia domo en Saint-Tropez, "La Treille-muscate" kaj ŝia Pariza apartemento, kiu donas vidon sur la ĝardenoj de l'Palais-Royal.*

*Siaj kvindek jaroj inaŭguras tiam kvaronon de jarcento de riĉa verkado kie la kutimaj temoj disfloras en la matureco.*

*"La Naissance du Jour (1928) kaj "Sido" (1929) estas poeziaj kaj voluptemaj elvokaĵoj de la provenca kaj burgonja naturo. "Duo" (1930) kaj " La Chatte" (1933) andlizoj pri la konfuzo de la ĵaluzeco. Tiuj "Plaisirs" kaj "Prisons kaj Paradis" (1932, boradoj en la misterajn ligecojn inter sensaĵojn.*

*Fariĝinta en 1935 S-ino Maurico Goudeket, Colette estas famkonata verkistino, membrino de la reĝa belga Akademio kaj de la Akademio Goncourt, altoficiro de la Honorlegio. Si akceptas la vivon tia, ĝi estas kaj rezistas kontraŭ la doloroj pli kaj pli akraj de artrito kun kuraĝo nuancita de kutima ironio.*

*La romanistino daŭrigas siajn studojn pri la virina animo en "Julie de Carméhan" (1941) kaj en "Gigi" (1943). Sed (Parizo el mia fenestro" (1942) associas la plisaĝigitan pripenson kun la poezia esprimo. Tria estos là tono de ŝiaj lastaj verkoj - ŝi forpasas en 1954 kaj tiuj titoloj lumigas la finon de tiu ekzistado per sensriĉaj lumoj.*

*Cu "L'Etoile Vesper" (1947) ne estas Venusa ekaperanta el la boskoj dè Saint-Sauveur meze de kvietigita krepusko ? kaj ĉu "La Fanal bleu" (1949) ne lumigas por ĉiam por ni, legantoj, tiun atenteman vizaĝon klinitan sur la nokta tablo, kie subtila mano karesanta la kutimajn katojn, detalas per neimitebla esprimo, la pripensojn kaj la spertojn de tuta vivo ?*




Ĉi supre reprodukto de la memorfolio N° 240 - Jam de la 1-7-72 la eldonejo C.E.F. en Nico emisiis filatelajn memortabulojn je la profito de socia servo de P.T.T. jam aperis 290 folioj el kiuj 80 en lingvo Esperanto. Interesatuloj en Francio povas aboni ĉe la Franca sekcio en GAP (30 F frankoj por 5 sinsekvaj ekzempleroj), en aliaj landoj (25 irk por 4 ekzempleroj).

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 1er Trimestre 1975

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes